

# SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

# La Espero

2017:3

## Universala Kongreso en Seoul, vidu raporton sur paĝo 7 (fotis Martin Häggström)



La Solena malfermo de la 104-a UK en la universitata salono  
President Barak Obama



Banderolo ĉe la enirejo de la tereno de Hankuk Universitato



Ett allt  
tommare  
EC,

(fotis Olof  
Petterson)



## Krome

Esperanto-knabinoj  
kaj Kerstin Rohdin,  
Vidu paĝon 6.

---

## LA ESPERO

---

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2017 • 105-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

**E-post till redaktionen:** laespero@esperantoforbundet.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeration:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**E-post:** svenska@esperantoforbundet.se

**Nätsida:** www.esperantoforbundet.se

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123

**Medlemsavgift:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.esperanto-gbg.org/eldona/

**E-post:** eldona@esperantosverige.se

**Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.esperantogarden.se

**E-post:** info@esperantogarden.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperantoforbundet.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

---

## LA ESTRARO

---

**S**ommaren är över och styrelsen har hunnit ha ett par Skype-möten efter sommaruppehållet. Vi har också beslutat att försöka träffas för ett tvådagars möte den 7-8 oktober hemma hos Puff och Jin i Örebro.

Lokalen på Vikingagatan är tömd och återlämnad till hyresvärderna. Böcker och annat som vi vill behålla har transporterats till Herrljunga och arkivhandlingarna har överlämnats till Riksarkivet. Nu har vi alltså möjlighet att i Herrljunga arbeta vidare med vårt bibliotek och arkiv, samt också att ha vissa möten där.

### Funktionärsträffen den 14-15 oktober

Ett sådant möte är Funktionärsträffen den 14-15 oktober, som representanter för klubbar och grupper är inbjudna till. Vi står för resa, 1-2 övernattningsnätter och måltider för en representant från varje klubb/grupp. Vill klubben skicka ytterligare någon medlem så får klubben stå för kostnaderna för denna. Frågor som vi vill ta upp är bl a 12-månaders medlemskap, central avgiftsuppbörd, kontakter mellan klubbar och grupper samt allmänt erfarenhetsutbyte rörande esperantoverksamheten i Sverige.

### Utåtriktad verksamhet

När det gäller utåtriktad verksamhet och information så har Olof hållit ett föredrag inför ett 20-tal åhörare i Jiddischsamfundet, vi kommer att ha en 1/4-sidesannons i Aftonbladets temabilaga Kultur & Nöje den 25/9 i samband med Bokmässan och vi kommer att delta med ett informationsbord vid Mänskliga Rättighetsdagarna i Jönköping 9-11 november. Olof har kontakt med Polska Institutet i Stockholm som planerar att ha en utställning för att uppmärksamma Zamenhof-året. Som vanligt är vid också med på Europeiska språkdagen i Europahuset i Stockholm 26 september.

### Nästa års kongress

Arbetet med nästa års kongress är i full gång. Se en första information på annan plats här i tidningen, notera tidpunkten i era almanackor. Ni kan följa uppdateringarna om kongressen i [esperantosverige.se/eventoj](http://esperantosverige.se/eventoj). Där kommer det att läggas upp information om program, tidplaner, kostnader och praktiska detaljer efterhand som de blir klara. Tänk efter om det är någon arbetsuppgift som du skulle kunna ta hand om och anmäl dig till Ann-Louise (0736170123, [annlouiseakerlund@gmail.com](mailto:annlouiseakerlund@gmail.com)). Om fler hjälps åt så blir arbetsbördan lättare för var och en.

*Styrelsen*

## Skandinavisk Jubileumskongress 2018

Nästa år är det 100 år sedan den första skandinaviska esperantokongressen hölls i Göteborg. Detta, i kombination med att vi redan tidigare kommit överens med det danska esperantoförbundet DEA om ett gemensamt arrangemang, gjorde att vi började undersöka möjligheterna att även involvera det norska förbundet NEL.

NEL accepterade inbjudan till samarbete, trots att de har sina årsmöten bara vartannat år och att 2018 för dem är ett "mellanår".

Vi kom fram till att en konferenskränsning mellan Köpenhamn och Oslo är ett både prisvärt och annorlunda arrangemang.

Konferenspaketet kostar SEK 2.425:- per person och inkluderar båtresa ToR, 2 övernattningar i delad dubbelhytt (tillägg SEK 400:- för egen hytt), 2 x frukostbuffé, en middagsbuffé inkl. dryck (öl, vin eller vatten), en trerätters sällskapsmeny (ej dryck) samt tillgång till konferenslokaler under överfarterna.

Båten avgår från DFDS-terminalen i **Köpenhamn** kl 16.30 torsdagen den 10 maj och återkommer lördagen den 12 maj kl 9.45.

Från **Oslo** går båten fredagen den 11 maj kl 16.30 och återkommer söndagen den 13 maj kl 9.45.

Du väljer själv i vilken stad du vill påbörja resan.

DEA och NEL kommer att erbjuda utflykt och/eller sightseeing i Köpenhamn och Oslo. De kommer också att boka plats på någon lämplig lunchrestaurang till den som så önskar. Information om kostnaderna för utflykter och lunch samt för transporterna till och från färjan i respektive stad kommer senare. Dessa kostnader betalas på plats, i lokal valuta.

## Jubilea Skandinavisk kongreso 2018

Venontan jaron pasis 100 jaron post la unua skandinava kongreso de esperanto. Tial, kaj pro tio ke ni jam antaŭe interkonsentis kun la dana esperantoasocio DEA pri komuna kongreso, ni decidis esplori la eblecojn involvi ankaŭ la norvegan esperantoasocion NEL.

NEL akceptis la inviton al komuna aranĝo, malgraŭ ke ĝia jarkunveno okazas nur ĉiun duan jaron kaj ne dum 2018.

Ni trovis ke surŝipa konferenco inter Kopenhago kaj Oslo estus kaj ekonomie favora kaj nekutima aranĝo. La konferenca pakajo kostas por persono po SEK 2.425 kaj inkludas ŝipvojaĝon dudirektan, 2 tranoktadojn en dividita dulita kabino (aldono SEK 400 por propra kabino), 2 matenmanĝajn bufedojn, unu vespermanĝan bufedon kun trinkaĵo (biero, vino aŭ akvo), unu tri-pladan komunan vespermanĝon (trinkaĵo ne inkludita) kaj uzon de konferencsalonoj.

La ŝipo ekveturos de la DFDS-terminalo en **Kopenhago** je la 16.30-a horo jaŭde la 10-an de majo kaj revenos sabate la 12-an de majo je la 9.45-a horo.

De **Oslo** la ŝipo ekveturos vendrede la 11-an de majo je la 16.30-a horo kaj revenos dimanĉe la 13-an de majo je la 9.45-a horo.

Eblis elekti en kiu urbo oni volas komenci la vojaĝon.

DEA kaj NEL ofertos ekskurson/gvidadon en Kopenhago kaj Oslo. Ili ankaŭ mendos lokon en iu taŭga restoracio por tiuj kiuj deziras tagmanĝi (lunĉi). Informoj pri la kostoj por ekskursoj, lunĉoj kaj transportoj al kaj el la ŝipoj, en la du urboj, venos pli poste. Tiujn kostojn ni pagos surloke, en loka valuto.

Sökes!

Person som kan ansvara för att ta emot anmälningarna till kongressen, sammanställa resandeförteckning till rederiet och deltagarlista till kongressmappen.

Det mesta av arbetet måste göras i början på april, då anmälningstiden gått ut.

Anmäl dig till Ann-Louise på [annlouiseakerlund@gmail.com](mailto:annlouiseakerlund@gmail.com) eller på tel 0736170123.

Andra arbetsuppgifter som vi kan dela på är t ex

- att utforma och sprida information om kongressen,
- att forska i historiska dokument och skrifter om det har hållits fler skandina-

- viska esperantokongresser,
- att vara värd ombord på fartyget och hjälpa till med utdelningen av hytter och kongressmaterial ...

Om vi hjälps åt och tar en bit var, så blir arbetsbördan mindre för var och en.

Ann-Louise

Sökes!

facebook

**Svenska Esperantogruppen** heter en ny Facebookgrupp för oss i Sverige som talar svenska och esperanto. Kontakt kan ske genom [hedrande@hotmail.com](mailto:hedrande@hotmail.com) och admin heter Asya och Kjell Randehed, tel 076-800 6147. Gruppen har sitt säte i Västerviks kommun.

Adm.



## Laboro pri vortaro: 3 literoj en interreto Jen noto pri la laboro pri la vortaro de Roland



**V**ortoj je la literoj U, Ŭ kaj V estas videblaj per interreto, en provizora formo.

Grupo da volontuloj sub gvido de Leif Nordenstorm laboras por enskribi elektronike la manuskripton de Roland Lindblom. La enskribo komenciĝis en la komenco de 2017. Tri personoj laboras pri la enskribo, alia pri evoluo de la komputila sistemo, kaj pliaj tri nun aliĝis por helpi pri kontrolado kaj aliaj laboroj.

La interreta adreso por la laboro estas sub la interreta paĝaro de la klubo de Gotenburgo, nome [www.esperanto-gbg.org/eldona/test/soktest.html](http://www.esperanto-gbg.org/eldona/test/soktest.html)

Tie vi povas rigardi ekzemplon pri traduko de esperanto-vorto je u, ŭ aŭ v al la sveda. Mallonga instrukcio en la sveda estas en la paĝo. Se vi enskribas parton de vorto, vi ricevas liston pri ĉiuj vortoj kiuj komenciĝas tiel.

La manuskripto estas farita de Roland Lindblom, kiu laboris je ĝi kune kun stockholmaj grupeto dum preskaŭ dudek jaroj. La lasta litero, mane skribita, estis farita nur kelkajn monatojn antaŭ lia morto en 2016.

Leif Nordenstorm daŭre serĉas kelkajn pliajn helpantojn, kaj oni povas kontakti lin je la adreso [leif.nordenstorm@gmail.com](mailto:leif.nordenstorm@gmail.com)

*Ulla Luin*

Sök esperanto-ord (mellan *u* och *vundi*; esperantotecken kan ersättas med den vanliga bokstaven följt av ett x):

varti: **vartado** passning, tillsyn, vård, skötsel

varo: **vartenejo** varulager

**varti** [tr] 1 passa, se efter, sköta om (barn, husdjur), 2 sköta om, vårda (fordon, teknisk utrustning)

varti: **vartisto** barnvakt, barnskötare (person som mer eller mindre professionellt sköter om barn)

varti: **vartotablo** skötbord

## Filmu tradician svedan pladon

**E**speranta retejo El Popola Ĉinio kun granda honoro invitas vin filme prezenti tradician pladon aŭ gastronomion de via lando, ni preferas, ke la filmon havu Esperantan klarigon.

Svedio havas tre riĉajn kuirarton kaj kulturon. Ni esperas, ke per via prezento e-istoj el diversaj landoj ekkonos vian landon, vian vivon kaj vian kulturon, tiele realigis la rolon de la pontlingvo Esperanto.

Preferinde, la filmo estu en:

Videa datenarango: MP4

Teksta lingvo: Esperanto

Filmado: horizontale

Maksimuma daŭro: 6 minutoj

La filmeto estu ju pli klare des pli bone.

Sendu al ni ([elpopolachinio@126.com](mailto:elpopolachinio@126.com)) antaŭ la 20-a de oktobro!

Ni aperigos la filmetojn en retejo de El Popola Ĉinio, kaj sur nia paĝo en socia retejo Panorama Ĉinio en [www.facebook.com](http://www.facebook.com)



Elkore, via  
E-sekcio de EPC

## Introduktionskurs i esperanto

**D**u larnu dig enkel konversacion och faru en inblick i det internationella spraket esperanto.

**D**et ar roligt att laru esperanto eftersom spraket ar logiskt uppbyggt och saknar undantag.

**D**et ar lattare att laru an andra sprak och du kommer att goru snabba framsteg.

*Tid: 21–22 oktober 2017, kl 10–15*

*Lokal: Malmö Esperantoförening, Kronetorpsgatan 94, Malmö*

*Kursen kostar 200 kr för båda dagarna, totalt 8 timmar.*

*Kaffe/te ingår samt viss kursmaterial.*

*Anmälan: senast 15 oktober till*

*[esperantoagado@outlook.com](mailto:esperantoagado@outlook.com)*

*eller tel 073 971 80 78 där mer*

*information kan fås.*

Den 103:e världskongressen i esperanto äger rum i Lissabon, Portugal, 28/7–4/8 2018.

Lär du esperanto fram till dess kan du också följa med!

**Välkommen på kurs!**

## Smolanda renkontiĝo

Kiam mi komencis plani biciklan vojaĝon laŭ "Sydstleden" de Växjö al Kristianstad, mi kontaktis la SEF-membrojn en la regiono por havi kafejan renkontiĝon en Växjö. Tio finfine realiĝis meze de junio ĉi-jare. Venis Meike Krüger el Åryd kaj Hans Linden el Växjö. Ni havis

agrablan interparoladon kaj ili promesis teni la kontakton inter si, kaj krome provi inviti ankaŭ aliajn esperantistojn en la regiono al pliaj kafejaj renkontiĝojn. Mi deziras al ili bonan sukceson.

*Ann-Louise*



## Grava paŝo por Esperantujo

Antaŭ du jaroj, nova kurso de Esperanto aperis, nome **Duolingo**. Jam antaŭe ekzistis multaj diversaj kursoj, sed tiu ĉi estis speciale grava. Kial? Ĉar Duolingo jam estis establita. Ĝi estis ellaborita, konata kaj populara lernilo.

Granda klarigo de la sukceso de Duolingo estas ke ĝi dekomence havis specialan koncepton; ĝiaj funkcioj estas inspiritaj de videoludoj. La lernanto progresas al niveloj kaj gajnas poentojn per fardo de malgrandaj taskoj, kiuj aperas unu po unu. Povas temi pri traduko de mallonga frazo aŭ elekto de la ĝusta inter tri alternativoj. Tiunmaniere oni ekzercas ne nur unuopajn vortojn sed ankaŭ gramatikon kaj vortordon. Eblas ŝalti memorigojn kiuj ade rekomendas onin ekzerci kelkajn minutojn ĉiutage.

Duolingo estas senpaga ilo, oni bezonas nur aliĝi. Plejmulto de la enhavo uzeblas per retumilo, sed ekzistas ankaŭ telefonaplikaĵo por ke oni povu iom ekzerci ie ajn.

Malgraŭ la laŭdeblaj avantaĝoj ekzistas kompreneble ankaŭ kritikoj: malmultaj uzantoj finas ĉiujn nivelojn, mankas parolekzercoj, kulturo estas apenaŭ montrata kaj enestas neniu literaturaj tekstoj. Tiuj kiuj kreis la kurson de Esperanto devis sekvi jam pretan modelon, kaj tial ne povis libere informi pri la Esperanto-movado same kiel en la kursoj de ekzemple lernu.net.

Eblas kontraŭargumenti ĉi tiujn plendojn sed anstataŭe mi volas gvidi al

alia perspektivo. La plej grava kaŭzo de la Duolingo-kurso ne okazas kiam persono lernas per ĝi, sed jam antaŭ ol tio.

Por decidi kio estas al ni grava ni devas pripensi kio estas nia celo. Al kio ni strebas? La revo de Zamenhof, tiel nomata "la fina venko" estas konata al plejmultaj esperantistoj kaj ankaŭ vaste ekster la movado. De tie venis la miskompreno kiun vi certe plurfoje estis dirata; ke Esperanto malsukcesis. Nuntempaj esperantistoj ne idealisme atendas la tagon kiam Esperanto finfine estos utila, sed jam nun ĝuas ĝian belan komunumon. Ni scias ke ĝi helpas al internacia interkompreno sen esti ĉies dua lingvo.

Kion mi volas estas ke homoj sciu ke Esperanto funkcias kaj utilas kaj ke ĉiuj esperantistoj estu respektataj kaj taksataj seriozaj. Al tiu celo Duolingo certe pliprosimigas nin.

Duolingo estas tre grava por Esperantujo ĉar ĝi videbligas nian lingvon. Tio ke Esperanto troviĝas inter la aliaj lerneblaj lingvoj en establita retejo komprenigas amason da homoj ke Esperanto estas funkcia, vera lingvo. Kion ni bezonas ne estas lerni sed sciigi. Tial la grupo de atingitoj ne konsistas el nure la miliono de eklernintoj, sed el ĉiuj de la cent milionoj registritaj uzantoj kiuj iam vidis la vorton "Esperanto" en Duolingo.

*Ingrid Antonia Berglund*



Esperanto lerneblas en Duolingo per la angla aŭ hispana. Kurso por portugallingvanoj estas nun ellaborata.

Notoj de la redaktoro: 1) Jam nun estas pli ol 1 miliono da registritaj uzantoj.

2) Katalin Kovats komencis la servon Ekparolu kiu ligas t.n. Genevoj kun Geonkloj por ke novaj lernintoj povu praktiki Esperanton. Unu celgrupo estas tiuj kiuj finis la kurson Duolingo. La servo Ekparolu donas al ili 10 eblojn konversacii kun maksimume dek spertaj esperantistoj (=geonkloj). La konversacioj okazas pere de skajpo.

Pli da informo ĉe Edukado.net: <http://edukado.net/ekparolu/prezento>.

La aŭgusta numero de la interreta revuo Turka Stelo havas intervjuon kun svedino Kerstin Rohdin, farita de Raita Pyhälä, "Saliko",



esperantistino en Finnlando, kiu konas Kerstin ekde la junaĝo.

Kerstin respondis al kelkaj demandoj okaze de naskiĝtago de Kerstin en la printempo de tiu ĉi jaro. Unue ŝi rakontas pri sia onklo Olle Olsson, instruisto en Lund, kiu multe instruis esperanton.

Post la lerneja tempo, Kerstin laboris en Gotenburgo, kaj tie aliĝis al junulara grupo kaj al la klubo, poste partoprenis TEJO-kongresojn. Jam tiam Kerstin konatiĝis kun pluraj konataj esperantistoj. Kerstin ankaŭ mencias, ke ŝi kontribuis al persvado al Lars Forsman ke li okazigu esperantokursojn en Karlskoga.

En Svedio Kerstin estas konata ĉar ŝi organizis turneojn de ali-landaj prelegantoj kaj aktoroj al kluboj, kaj pere de kluboj ankaŭ en bibliotekoj en Svedio. Ŝi organizis grupvojaĝojn el Svedio al renkontiĝoj en Hungario, Siberio, Pollando kaj Estonio. Ŝi tradukis du el la libroj de Astrid Lindgren al esperanto kaj organizis la eldonon de ili, kaj ankaŭ prelegis pri tiu tre konata verkistino.

Vi trovos la tutan intervjuon en numero Aŭgusto 2017, paĝoj 13-14 je la ligilo: <https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuetto/>

*mallongigis: Ulla Luin*

## Leteroj revivigas homojn

Iam, jam antaŭ pluraj jaroj okazis al mi, ke en mia mano estis donita stoko da malnovaj leteroj. Mia malnova amikino Editha Köhler estis la perantino. Ŝi petis min, ke mi trovu bonan vojon por tiuj leteroj.

Kiel ofte okazas la vojo tra la vivo estas zigzaga eĉ por leteroj. Antaŭ monato tiu stoko da malnovaj leteroj denove atingis miajn manojn. Kio okazu al ili? Kien iru la vojo por ili? Dum noktoj, dum sendormaj horoj la cerbo laboris: "Kie ili povas revivi? Kien ili povas alporti ĝojon kaj energion? Kie povus reviviĝi la homoj, kiuj klopodis kaj skribis?"

La adresito de la leteroj estis la sveda verkistino Anna Lorenz. Ŝi loĝis en Värnamo, Svedio. Ŝi verkis plurajn librojn. Plej konata estas ŝia serio pri la

virino Lina. Ĝi temas pri knabino/ virino, kiu vivis en Smolando dum la 19-a jarcento. Anna Lorenz interesiĝis pri kaj eklernis esperanton. Verŝajne helpe de Edita ŝi enmetis sian deziron korespondi en kelkajn esperantajn gazetojn, bulgaran, hungaran, ĉeĥan, germanan. Tio okazis en la 1980-aj jaroj.

Ŝin atingis responde multaj diverslandaj respondoj. En mia stoko estas sepdeko da leteroj de diversaj personoj, kiuj deziras korespondi pri literaturo, arto kaj pri la VIVO. Legante la leterojn oni forte sentas ilian entuziasmon pri esperanto kaj ilian sopiron havi kontakton kun samideanoj alilandaj. Konsciis, ke tio ĉi okazis en la 1980-aj jaroj.

Do kiel revivigu tiujn homojn? Post pluraj noktoj de cerbumado, mia penso falis sur aktivan grupon "Esperanto-knabinoj" en Hämeenlinna, Finnlando, al kiu mi kelkfoje estis invitita. Mi kontaktiĝis kun ili kaj denove estis invitita al agrabla kunveno ĉe ili. Ili tre interesiĝis pri la projekto tralegi la leterojn, interparoli pri

la enhavo de la leteroj, pri la personoj, kiuj ilin verkis, revivigi la homojn.

La klubo "Esperanto-knabinoj" festas venontjare la 30-an jubileon pri la kluba ekzisto. Ilin jam kaptis ideo prezenti ekspozicion en la urba biblioteko pri la 30-jara ekzisto de la klubo kaj pri la donaco de la leteroj. Ili montras kiel esperanto povas esti vivanta kunligilo inter diverslandanoj, eĉ kiam la inter-korespondantoj ne plu vivas.

Nun kiam la interlandaj/interhomaj kontaktoj per tekniko plifaciliĝas lasu ni niajn ideojn/niajn pensojn "per facilaj ventoj flugi de loko al loko"! Mi invitas la iamajn skribintojn saluti la nunajn esperanto-knabinojn en Hämeenlinna. Mi ankaŭ invitas vin, kiu legas tion ĉi, trovi novajn korespondgeamikojn en la mondo.

La kovertoj portas belajn, malnovajn poŝtmarkojn.

UEA anoncis, ke 2019 UK okazos en Finnlando.

*Kerstin Rohdin*



Mi enmanigas la leterojn en la manon de Marjatta Niemi



## Mia vojaĝo al la 102-a UK

Mian somerdomon en Kalix mi forlasis la 20-an de julio por iri al la 102-a Universala Kongreso en Seoul.

Mi veturis per aŭto al la flughaveno de Kemi kaj poste per aviadilo tra Helsinki al Seoul. Per trajno, metroo kaj kelkcentmetra promeno mi alvenis la postan tagon al la malgranda hotelo, kie mi jam antaŭmendis ĉambron.

Trovi la hotelon ne estis facile ĉar la adreso estis malfacila kaj la hotelŝildo estis skribita nur per koreaj literoj. Krome la akceptistino nur parolis la korean. La vetero estis terure varma kaj malseka dum miaj du unuaj tagoj en Seoul, kaj la ŝvito fluis abunde post nur centmetra promeno.

Sabaton la 22-an de julio mi iris al la kongresejo en Hankuk Universitato por partopreni komitatitan kunsidon, ĉar mi anstataŭis Ann-Louise Åkerlund kiel komitatano. Poste en la vespero estis movada foiro. En pluvego la postan tagon mi iris al la Solena inaŭguro,



Kallese till Esperanto-Gårdens årsstämma i Lesjöfors Esperanto-Gården i Lesjöfors ekonomisk förening kallar till årsstämma lördagen den 11 november 2017 kl. 14.00 på Esperanto-Gården. Stadgeenliga ärenden.

Ni är välkomna på träff fredag-lördag 10-12 november. Vi diskuterar Kultura Esperanto-Festivalo 13-19 juli 2018 och har det trevligt tillsammans.

Välkommen!

Styrelsen genom ordförande

**Anna Ritamäki-Sjöstrand**

kiun multaj certe maltrafis pro la vetero.

Estis multaj interesaj prelegoj dum la kongreso, sed plurajn mi maltrafis ĉar mi partoprenis komitatitajn diskutkunvenojn. Estis ankaŭ kelkaj distraj programoj, eĉ futbalmatĉo kontraŭ loka teamo, kaj en tiu matĉo la Esperanto-teamo venkis.

La komitatitaj kunvenoj ne estis tute bone preparitaj, kaj tial kelkajn gravajn decidojn oni prokrastis ĝis la aŭtuno. Parolemaj komitatanoj faris la diskutojn viglaj, kaj laŭ mia opinio iuj komitatanoj estis tro parolemaj. Pri multaj pli malpli gravaj aferoj ni voĉdonis. Mark Fettes, la prezidanto de UEA, gvidis la kunvenojn tre lerte. Pri la diskutoj kaj plendoj legeblas multaj detaloj en la movada retbulteno *Libera Folio*.

Marde mi partoprenis duontagan ekskurson al la palaco Changdeok-gung. Ĝi estis ekkonstruita en 1405 kaj estis longtempe loĝata de koreaj reĝoj. Ĝi estas bone konservita kaj havas belajn ĝardenojn laŭ korea tradicio. Nuntempe ĝi estas monda kultura heredaĵo de UNESKO.

Dum la ekskursita tago merkrede mi iris kun grupo al la limregiono inter suda kaj norda Koreio, kie ni rigardis ekspoziciojn kaj filmojn pri la limregiono kaj ĝia senarmeigita zono. El la observatorio en Dora monto ni povis vidi malgrandan parton de norda Koreio. Proksime ni vizitis kaj eniris la

## KUNE – TRA ESPERANTIO

3-an infiltran tunelon el norda Koreio, kiun suda Koreio malkovris en 1978. Tiu tunelo estas unu el almenaŭ 4 similaj tuneloj en la limregiono.

Ni ankaŭ vizitis la grandan trajnstationen en Dorasan de kie estas fervoja linio al norda Koreio. En 2007 kaj 2008 funkciis limigita trajntrafiko inter la du landoj sed ne poste.



Ni kongresanoj povis manĝi en la universitata manĝejo inter la studentoj. Ankaŭ kelkaj pli junaj lernejoj kun instruistoj manĝis tie. Unu vesperon mi partoprenis akcepton por anoj de Societo Zamenhof. En tiu agrabla kunveno oni regalis nin per diversaj koreaj manĝaĵoj.

La solena fermo estis antaŭtagmeze sabate la 29-an. Poste, sabate kaj dimanĉe, mi ekskursis sola en Seoul kaj tiam plejparte nur ĉirkaŭvagadis en la enorme granda urbejo. Lunde la 31-an de julio mi flugis hejmen kaj alvenis mian somerdomon la saman vesperon.

*Martin Häggström*

## Kultura Esperanto-Festivalo Esperanto-Gården i Lesjöfors

13–19 juli 2018

La planado de la 10a Kultura Esperanto-Festivalo la 13an de julio ĝis la 19a de julio 2018 komenciĝis dum la somera kurso en Esperanto-Gastigejo komence de julio. Notu la datojn! Helpu nin disvastigi la eventon kaj kunkrei plenamplaksan 10an KEF, la plej gravan feston de originala esperantokulturo.

Iom post iom la informo estos ĝisdatigita kaj ligos vin al pli ampleksa KEF-retejo.

Evenemanget på Facebook: / Jen ligo al la evento en Facebook: <https://www.facebook.com/events/181651099042155/>

**Anna Ritamäki-Sjöstrand och Martin Strid**

Från arrangörgruppen/nome de la organiza skipo

**D**um la legado de *Bridge of Words* de Esther Schor, mi cerbumis pri konvena karakterizado de la libro. Oni ne facile klasifikas ĝin laŭ certa ĝenro. Sed la aŭtoro kvazaŭ helpeme mem donas karakterizon en la fino, kie ŝi citas respondon pri la libro, kiun ŝi donis al Ursula Grattapaglia: “*Estas hibrido, historio kaj memoraĵoj. Temas pri Zamenhof, lia lingvo, liaj revoj kaj la homoj al kiuj li konfidis la evoluigon de esperanto, tiam kaj nun. Temas pri esperanto kiel ponto de vortoj kaj ĉiaj internaj ideoj kiuj trapasis ĝin. Kaj temas pri mia vagado en Esperantujo, la homoj kiujn mi renkontis en Eŭropo, Azio, Kalifornio, ĉi tie....*’ Mi ne diris ke temas ankaŭ pri mi, kvankam mi neniam intencis tion; pri kiel esperanto helpis min kontroli mian mezaĝulan angoron por komuniki tion, kion mi bezonis diri. *Kaj la lasta ĉapitro temas pri Bona Espero*” (p. 316).

Do, estas verko de pluraj ĝenroj, kelkfoje kunfanditaj, kelkfoje apartigitaj. La libro estas rezulto de sepjara vivado en Esperantujo de profesia studanto (usona profesoro pri la angla lingvo ĉe la universitato de Princeton), kiu volis “malkovri kial esperanto, nekredible, venkis ĉiajn defiojn: konkuradon de rivalaj lingvoprojektoj, du mondmilitojn, totalismajn reĝimojn, genocidajn mortfabrikojn, la konkuradon de nukleaj armiloj kaj la aperon de fundamentista sektismo – ne menciante la

ruinigon de la tutmonda angla lingvo” (p. 9–10).

Partoj de la libro memorigas pri klasikaj vojaĝpriskriboj. Tiaj estas, ekz. la rakontoj pri la travivaĵoj kaj pensoj lige al la kongresoj en Hanojo, Havano kaj Bjalistoko, kaj la ĉapitro pri la brazila infanejo Bona Espero, inspirita de la aŭtoro restado tie.

Ankaŭ en anima senco la teksto grandparte similas al vojaĝpriskribo. La aŭtoro raportas detale, kvazaŭ post esplorvojaĝo, kiel ŝi dum studado, observado kaj partopreno malkovras la lingvon, ties uzantojn kaj komunumon. Tio estas sukcesa metodo, kiu faras la tekston kaj viva kaj informriĉa.

Kompare kun aliaj priesperantaj libroj, alia forta punkto en *Bridge of Words* estas la analizoj de la rilatoj inter esperanto kaj la eksteresperanta mondo. La aŭtoro ne evitas tiklajn politikajn demandojn kiel la dissplitiĝon de la usona movado dum la “malvarma milito” aŭ la sorton de esperanto dum Hitlera kaj Stalina reĝimoj, nek bataloj ene de UEA aŭ atakojn kontraŭ ĝi.

Unu detalo ŝajnas al mi ne konvinke motivita, ja, tute ne motivita. La aŭtoro “uzis pseŭdonimojn de la plej multaj menciitaj esperantistoj”, escepte de “historiaj figuroj kaj cititaj aŭtoroj” (XV). Tia pseŭdonimigo ĝenerale ŝajnas nebezonata, precipe kiam la aluditaj personoj ne estas malfavore prezentitaj. Cetere, la pseŭdonimo ofte ne kaŝas la identecon.

Ekzemple, la pseŭdonimo Benedikt estas “svedo”, “profesie programisto”, “en Esperantujo, tamen, li estas rokmuzika stelulo, fondinta membro de la bando Persono”.


krome, li estas “gramatikisto, aŭtoro de PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko)”; “li eĉ estas membro de la Akademio de Esperanto” (p. 42).

Dirinte tiom multe, kial provi kaŝi, ke temas pri la atestimata Bertilo Wennergren?

Kritiko pri detaletoj kompreneble ne forprenas la impreson de altkvalita, tre leginda libro, plurrilate unika. Sed tiu legonto, kiu ne majstras la anglan lingvon kiel denaskulo, ekipu sin per moderna ampleksa vortaro, ĉar la aŭtoro uzadas la esprimeblecon de la granda angla vortprovizo kaj ne limiĝas je la plej oftaj vortoj kaj esprimoj.

*Bo Sandelin*

Esther Schor, *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*. New York: Metropolitan Books, 2016. ISBN 978-0-8050-9079-6.



## Marjorie Boulton en nia memoro

**L**a 30-an de aŭgusto forpasis Marjorie Boulton, ŝatata esperanta verkisto.

En Vikipedio ni trovas la jenan informon:

Ŝi naskiĝis la 7-an de majo 1924 – mortis la 30-an de aŭgusto 2017. Ŝi estis verkanta kaj en la angla lingvo kaj en Esperanto. Ŝia verkaro ampleksas poeziaĵojn, dramojn, novelojn, rakontojn kaj eseojn. Krome ŝi tradukis Esperanton ŝi eklernis en 1949. En 1967 elektita ŝi estis membro de la Akademio

de Esperanto. Honora membro de Universala Esperanto-Asocio.

La verkado de Marjorie Boulton estas matura kaj socie engaĝita. Ĝin trapenetas varma tono kaj sincero. Evidentas ankaŭ ŝia impulsa formtrova kapablo kaj sento pri humuro. El la propra intimo ŝi lasas aperi siajn pasiojn kaj turmentojn, tiel nudigante antaŭ la leganto sian animon. Aliflanke per verkoj emoci-lirikaj ŝi prezentas kaj defendas sian idealisman humanismon.

Pli da informoj vi trovas en la retejo Originala Literaturo Esperanta:

<http://esperanto.net/literaturo/autor/boulton.html>

kaj en Libera Folio:

<http://www.liberafolio.org/2017/08/31/forpasis-marjorie-boulton/>

kaj en Edukado.net

<http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=30>



Marjorie Boulton en 1997.  
Vikipedio (CC BY 3.0)